

Protokolo de estrara interkonsiliĝo la 8-an de septembro 2016 je 19.30h per Skajpo.

Partoprenantoj: Mario Machlik, Anne Karin Bondhus, Herman Raner, Hilde Dahlberg, Ulf Lunde (ekde punkto 6.)

0. Tagordo

Aprobata

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 18-an de aŭgusto

Aprobata

2. Ekonomio

Skagen Vekst 51 751 kr (51 118 kr)

Skagen Høyrente 129 676kr (129 520 kr)

3. Landa kunveno 2017

Anstataŭ la 2-a ĝis la 4-a de junio ni esploras la eblecon havi la Landan Kongreson pli poste. Anne Karin demandas la kunorganizantojn, kiuj datoj povus esti la plej konvenaj.

4. Strategia plano, laborplano

La Landa Kunveno elektis komisionon kiu antaŭ la fino de 2016 prezentu al la estraro proponon de strukturoj de la laborplano kaj la strategia plano.

Membroj en la komisiono: Torstein Kvakland, Judith Parelle Abrahamsen kaj Leif Arne Storset. La estraro sendu al la membroj de la komisiono memorigan retmesaĝon pri tiu tasko.

5. Seminario

Lu akceptis esti preleganto por la seminario. Ebla dato povus esti sabato, la 12-a de novembro, ekzemple inter la 14-a kaj 16-a horo. Ni demandas lin pri eventuala honorario.

6. Ekzamena komisiono

En Oslo Mario parolis kun Otto Prytz pri la defioj de la nuna ekzamena sistemo de NEL. Li proponis, ke li verkos novan dokumenton por pritakso en la Landa Kunveno. Hilde menciis, ke ni devus provi enkonduki (transpreni) la KER-ekzamenan sistemon. Ni provos inviti Otto por la venonta interkonsiliĝo kaj kune plupensi tiun ĉi temon.

7. Eventualaĵoj

Mario faris viziton en Esperantonia pasintmonate. La kunvenĉambro estas en ordo, sed la mebligado oni povus plibonigi, ankaŭ aperis multaj libroj, kiuj Douglas devus surbretigi. La fenestrojn kaj la enirpordojn oni devus ripari, aŭ ŝanĝi. Herman esploras, ĉu la domposedantaro povus helpi fari tion. Verŝajne ankaŭ farbado povus esti baldaŭ aktuala. La kelo nun estas seka, sed tro plena da diversaj aĵoj, stokitaj tie.

La interkonsiliĝo daŭris de 19.30h ĝis 20.55.

La dato por la venonta interkonsiliĝo: la 13^a de oktobro.